

# POLA ESPERANTISTO

Monata Organo de Polaj Esperantistoj



## ESPERANTYSTA POLSKI



Organ Esperantystów Polskich

Augusto 1910.

WARSZAWA—VARSOVIO.

Jaro III (V) Nr. 8.

## Z ruchu esperanckiego.

W ostatnim zeszycie organu oficjalnego esperantystów „Oficiala Gazeto esperantista” podana jest statystyka ruchu esperanckiego do końca 1909 r. Statystyka ta zawiera dane nie tylko dotyczące liczby towarzystw esperanckich, lecz również wykazuje ruch czasopism i wogóle literatury esperanckiej.

W roku zeszłym p. A. Zakrzewski podał w organie naszym dane statystyczne z ruchu esperanckiego za okres czasu od 1887 - 1908, t. j. od początku istnienia Esperanta, aż do końca roku 1908.

Jeżeli porównamy statystykę p. Zakrzewskiego z ostatnim wykazem, podanym przez Centralne biuro w Paryżu, zauważymy pewną niezgodność w cyfrach. Niezgodność ta zależy od tego, że dotychczasowa statystyka, podawana przez organ Centralny, zamylała zawsze połowę roku, przed każdym wszechświatowym kongresem esperantystów. Obecnie statystyka ta została unormowana i przeprowadzona do końca każdego roku.

Wogóle liczba towarzystw podawana przez biuro centralne jest bezwarunkowo mniejszą od rzeczywistej liczby, gdyż wiele związków esperanckich wcale nie zawiadamia o swoim istnieniu, albo czyni to z opóźnieniem, co bezwarunkowo odbija się na ścisłości danych statystycznych.

Dotyczy to głównie towarzystw nie-europejskich, które posiadają własne

zarządy centralne i często łączą się w większe stowarzyszenia lub rozdzielają się według zawodów.

Poniżej podajemy statystykę ruchu towarzystw za ostatnie trzy lata\*).

	1907	1908	1909
<b>Europa</b>			
Anglja	127	164	175
Austrja i Węgry	56	92	164
Belgja	25	33	38
Bułgarja	16	24	17
Danja	6	17	12
Francja	180	222	249
Hiszpanja	58	93	73
Holandja	8	21	31
Niemcy	57	170	222
Norwegja	1	4	4
Portugalja			3
Rosja	13	55	85
Rumunja	4	8	14
Szwajcarja	24	25	26
Szwecja	24	15	22
Włochy	13	19	10
<b>Afryka</b>	9	11	12
<b>Ameryka północna</b>	60	173	175
„ południowa	21	71	75
<b>Australja</b>	7	12	12
<b>Azja</b>	12	27	28
<b>Razem</b>	<b>721</b>	<b>1266</b>	<b>1447</b>

\*) Kto interesuje się sprawą od początku istnienia Esperanta może się zapoznać z nią z wyczerpującej pracy p. A. Zakrzewskiego, wydanej w jęz. Esperanto pod tytułem „Esperanto en unua dudekjaro 1837-1909”.

Z danych powyższych widzimy, że liczba towarzystw w ostatnim roku powiększyła się o 181. Natomiast w niektórych krajach, jak w Bułgarii, Danii i Włoszech liczba ta zmniejszyła się. Zdawałoby się, iż dowodzi to o zmniejszonym ruchu esperanckim w tych krajach; w rzeczywistości zaś jest to skutek ogólnej dążności towarzystw esperanckich do zjednoczenia. W niektórych, naprzykład, miastach jak w Paryżu, Berlinie, Barcelonie i innych mniejszych istnieje po kilka towarzystw. Ponieważ doświadczenie wykazało, że istnienie mniejszych towarzystw jest niewygodne pod wielu względami, w niektórych krajach szczególnie mniejszych rozpoczął się ruch w kierunku centralizacyjnym. Szczególnie uwydatniło się to we Włoszech, gdzie po ostatnim zjeździe we Florencji postanowiono utworzyć federację towarzystw włoskich zamykając przy tym kółka w mniejszych miastach, które rozwijają się bardzo ospale wskutek braku środków materialnych. Wogóle Włochy należą do rzędu tych krajów, które do dnia dzisiejszego najmniej poddają się propagandzie naszej sprawy. Czemu przypisać tę oporność trudno orzec, najprawdopodobniej — brakowi zabiegliszej propagandy. W wielu krajach, w których Esperanto nie stanął jeszcze mocniejszą stopą, wahania w ruchu są zjawiskiem częstym.

Jeżeli zajrzemy do statystyki lat ubiegłych przekonamy się, że w Rosji w której obecnie Esperanto rozpowszechnia się bardzo dobrze (85 towarzystw), w roku 1898 było towarzystw 17, w 1900 — 10, w 1901 — 6, a w 1902 tylko 4. Sądzono wówczas, że Rosja bezwarunkowo jest krajem niepodatnym dla naszej sprawy, jednak dzięki energicznym zabiegom nowych zwolenników Esperanta w r. 1907 liczono już tu 13 towarzystw, a w 1909 — 85, obecnie, sądząc z wiadomości podanych przez rosyjskie gazety esperanckie liczba ta przerosła 100. To samo było również w Szwecji, gdzie w r. 1898 było 7 towarzystw, w r. 1901 zaś tylko 1.

Tylko w większych krajach sprawa nasza stale postępuje naprzód. W Au-

strii liczba towarzystw w ciągu 1909 wzrosła prawie podwójnie, w Niemczech przybyło 52 tow., we Francji 27, w Anglii 11. Pod względem liczebnym dotychczas Francja wciąż przoduje, na drugim miejscu należy postawić Niemcy, a następnie Anglję, Stany Zjednoczone i Austro - Węgry. Najmniej, jak dotychczas, Esperanto rozpowszechnia się w Portugalji (3 tow.)

W Afryce i w Australji ruch znajduje się w okresie początkowym.

W tablicy wydanej przez biuro centralne, niestety, brak danych statystycznych o wielu krajach, jak naprzykład o Polsce, która liczy 24 towarzystwa, widocznie wciągnięte one zostały pod ogólną rubrykę towarzystw w Rosji, o Grecji, która liczyła w roku zeszłym 6 tow., Finlandji (13 tow.), brak również poszczególnych danych o Japonji (6 tow.) Chinach (2 tow.) i t. d.

Z innych danych statystycznych, podanych przez organ oficjalny, ciekawie się przedstawia rozwój czasopism esperanckich. W roku 1907 liczono ich 61, w 1908 — 99, w 1909 — 106.

Liczby te dotyczą tylko pism wychodzących stale. Jeżeli dodamy do nich cały szereg pism, wychodzących nieregularnie, często pod różnemi tytułami—liczby te wzrosną znacznie. Według obliczeń p. A. Brzostowskiego dotychczas wyszło przeszło 200 pism esperanckich.

Po raz pierwszy zostały ogłoszone również dane wogóle o rozwoju literatury esperanckiej. Ogólna liczba wydanych dotychczas tomów wynosi 1327; z tych 48 przedstawia oryginalną literaturę; z przekładów najwięcej dostarczył język francuski 58 tomów, następnie angielski, rosyjski i polski.

Najwięcej podręczników wydano dla Rosjan (55), Francuzów (43), Anglików (43), Niemców (30). Ciekawie przedstawia się wzrost literatury esperanckiej w ciągu ostatnich 10 lat:

W r. 1889	wydano	29 tomów.
„ 1894	„	88 „
„ 1899	„	123 „
„ 1904	„	211 „
„ 1909	„	1327 „

Należy przypuszczać, że statystyka

literatury esperanckiej, jako łatwiejsza do przeprowadzenia, jest bliższą rzeczywistości, niż dane dotyczące towarzystw. Jednak i tu bez wątplenia wkradły się różne nieścisłości. O ile udało nam się na razie sprawdzić, liczba tomów przetłumaczona z języka pol-

skiego np. jest o wiele większa niż 24. Zdanych, które posiadamy, wynosi ona 32. Wobec tego, że prawdopodobnie zmniejszono właściwą liczbę tomów, przełożonych z innych literatur, należy przypuszczać, że ogólna liczba książek esperanckich jest o wiele większa.

P. Zvezdic.

## Anguleto de musikema Vieno.

Tie, kie finiĝas Vieno de mult-etaĝaj domoj-kazernoj, kie ombroplena Turkenŝanckparko rigardas la najbarajn vilaĝojn, jam de longe staras famekonata „ruĝa villo”, malgranda villo kun malalta tureto, distinganta tiun ĉi villon inter ĉiuj aliaj unuloĝejaj domoj de la kvartalo, konata sub nomo „Währing-Cottage“.

En la „ruĝa villo“ jam de 30 jaroj loĝas kaj — pli vere — faras diservon vera papo de pianistoj de l' tuta mondo, Teodoro Leszetycki (Leŝeticki), kiu antaŭ kelkaj semajnoj festis sian 80-an naskiĝtagon\*).

Tri generaciojn de pianistoj jam estas edukinta „la ruĝa villo“, inter ili troviĝas Paderevski, Gabriloviĉ, Marko Hamburg kaj aliaj, kiuj jam atingis supron de l' gloro en sia profesio. Ĉu estas do mirinde, ke la „ruĝa villo“ ĉe Turkenŝanckparko jam de longe fariĝis Mekko por pianistoj de l' tuta mondo, kaj ke la pilgrimvojaĝo al la „majstro“ fariĝis sankta devo por ĉiu, kiu sin dediĉas ekskluzive al fortepiano?

„Disciplo de Leszetycki“ — tio estas nuntempe diplomo, malfermanta al la posedanto la pordojn de l' tuta muzikema mondo. Kaj en Ameriko tiu-ĉi kulto de Leszetycki atingis tian gradon, ke tie eĉ virtuozoj, se ili ne estas „disciploj de Leszetycki“, vekas dubojn, kaj fariĝi instruisto pri muziko tie preskaŭ

estas neeble, ne estinte „disciplo de Leszetycki“.

Centope venas pianistoj el Nov-Jorko, San-Francisko, el Buenos-Aires, Rio de Janeiro kaj Valparaizo, el Nov-Zelando kaj eĉ el la insularo Fidĝi, el Kairo kaj el Svedujo, el diversaj urboj de Rusujo, kaj monatojn ili pasigas tie ĉi por havi post tio la rajton dum la tuta vivo esti nomataj „disciploj de Leszetycki“. Ne malmulton oni oferas por ricevi tiun-ĉi honoran nomon! Fariĝi nuntempe „disciplo de Leszetycki“ tute ne estas tiel simpla afero. „La majstro“ estas tre elektema, kaj eĉ lia promeso, ricevita de li post grava ekzameno, „doni lecionon“ estas ŝatata, kiel titolo de kavaliro de fortepiano, ĉar tiun promeson ricevas nur tiuj, de kiuj la majstro ion atendas. Sed post la promeso „doni la lecionon“ ĝis la leciono mem oni devas ankoraŭ labori kaj labori. Al mistero de la leciono oni devas sin prepari dum semajnoj kaj monatoj ĉe kelkaj liaj helpantinoj, kiuj alproprigis al si la metodon de Leszetycki kaj ricevis de li la rajton gvidi la ekzercojn de aspirantoj.

Okazas, ke iu pianisto pasigas duonon da jaro en Vieno, ne ricevante la la permeson veni antaŭ la severajn okulojn de l' majstro, kiu senceremonie forpelas de l' fortepiano plej majestan anglan „miss“\*), se ŝi aperas antaŭ li ne sufiĉe bone preparita. Sed eĉ tiu-

\*) Li estas Polo kaj naskiĝis en 1831, apud Kraków (Krakovo). Red. de „P. E“.

\*) Fraŭlino.

okaze la tempo ne estas konsiderata, kiel perdita, ĉar la ebleco mem pasigi kelkajn monatojn en ekzotika kolonio, ĉirkaŭanta „la ruĝan villon“ estas jam multe ŝatata. Tie-ĉi nenio ekzistas, ekster muziko kaj musikaj intereso.

„Disciploj“ de Leszetycki formas sia-specan regnon en regno, kie reĝas kulto de la muziko kaj kie oni komuniĝas je ĉiuj ĝiaj misteroj. Sed kulminacian punkton atingas tiu-ĉi kulto dum „vesperkunvenoj“ de Leszetycki, pli konataj sub la nomo de „klasoj“.

Tiuj vesperkunvenoj efektive prezentas interesplenan spektaklon. Ne tre granda, longforma, kvarfenestra salono de la „ruĝa villo“ estas plenplena je entuziasmaj aspirantoj de la senmorteco. Tie oni povas vidi fiere aspektantajn blondajn Anglinojn en luksaj toaletoj, flavruĝajn Amerikaninojn kun liberaj manieroj, graciajn delikatajn Polinojn, beltalijajn palajn Svedinojn, longharajn reprezentantojn de ĉiuj regionoj de Rusujo, altkreskajn, longbrakajn, longkrurajn Amerikanojn kun fortikaj, grandaj dentoj kaj revemajn Polojn kun kapricaj bantoj de iliaj larĝaj kravatoj. Oni staras kaj sidas, kie oni trovas lokon: ŝur piedestaloj, sur fenestraj platoj, sur stupoj, kondukantaj en apudan manĝoĉambron, sed ĉies okuloj estas turnitaj unuflanken, kie ĉe la kontraŭa muro de l' salono staras du fortepianoj. Al unu fortepiano proksimiĝas per rapidaj paŝoj angla „miss“, ĝis tiam tiel fierega kaj nealirebla kaj nun tute ruĝa pro ekscito, — sidiĝas kaj, mallevente la okulojn, donas la unuajn akordojn. Ekreĝas streĉita silento! Plej atente aŭskultas la majstro mem, kiu sidas ĉe la dua fortepiano. Jen lia vizaĝo sulkiĝas, kaj la korbatoj haltas ĉe ĉiuj. La majstro estas neelpetebla. Mem granda artisto, erarojn li ne konsideras kiel gravajn. Se tio estis nur eraro, li mem tuj ekludas alian fortepianon, spronas kaj entuziasmigas la artiston, laŭbezone, aŭ haltigas lin per sia akompanado se li tro rapidas, iafoje lerte moligas kaj reguligas iun akraĵon. Sed se tio ne estis eraro, sed „krimo“, la majstro fariĝas senkompata kaj batas la artiston per akra ironio: „Se vi opinias, ke

la ĉefo en la ludo estas tondro, iru aliloke tondri la ŝlosilojn. Ĉe ni ne estas serurejo“. Kaj li senceremonie publike forigas de l' fortepiano la fieregan anglan „miss“, kiu, preskaŭ plorante, elpetas de li la permeson ludi ankoraŭ la malsukcesintan parton. Kaj neniu sentas sin ofendita de l' majstro! La dogmo pri lia neerarebleco estas pie ŝatata de ĉiuj. Krom tio, ĉio okazis „hejme“, kaj la ĉeestantoj scias, ke la sama malfeliĉo iam estis trafinta tiujn, kiuj nuntempe superas la majstron per sia gloro.

Tiuj-ĉi eminentuloj ankaŭ iafoje vizitas la „ruĝan villon“. Tie en Vieno la eminentulo hieraŭ aŭ hodiaŭ estis objekto de bruantaj ovacioj de multmila aŭskultantaro, en kies mezo ĉeestis la majstro kaj liaj disciploj. Sed la „ruĝan villon“ li ree eniras kvazaŭ por ekzameno. Kaj li ree kun la sama emocio, la sama konfuziĝo, kiel antaŭ multaj jaroj, proksimiĝas al la kara fortepiano kaj, fininte sian ludon, atendas aprobantan rideton de l' majstro, kiu por li estas pli kara ol la laŭdegoj de la tuta gazetaro. Tiu-ĉi rideto aŭ kelkaj aprobaj paroloj de l' majstro estas plej alta rekompenco por ĉiu pianisto, ludanta en la „klasoj“. Se la majstro ne interrompis la ludon, do li estas kontenta. La aŭskultantoj aplaŭdas. Sed ne tion ĉi soifas la artisto. Li rapidas al Leszetycki kaj penas legi sur lia vizaĝo sian verdikton. Kaj unu sola vorto de l' majstro forigas ĉiujn dubojn...

Magister dixi!

Tio-ĉi „magister dixi!“ fariĝis en la lastaj jaroj plej alta instanco por la tuta muzikema mondo, kiu post longa kontraŭstaro fine akceptis la metodon de Leszetycki. El kio konsistas tiu-ĉi metodo de Leszetycki, lia „disciplino“, neniu al vi klarigos. Vi eĉ riskas ricevi tute malsamajn respondojn al via demando. Videble, la ĉefo ne konsistas el la metodo.

Kaj Leszetycki mem neniam „metodigis“ sian propran metodon, tion faris liaj helpantinoj: Malvino Brej, Mario Pretner, Mario Unŝuld, kiuj instruas laŭ lia metodo, sed kiuj... ne povas anstataŭi la majstron. Ĉar, krom la metodo,

li posedas ion, kio estas propra nur al granda artisto, al genio, tio estas sci-povo individuigi aŭ diveni la esencon de ĉies talento kaj samtempe diveni la metodon plej taŭgan por plena disvolv-igado de ĉiu talento. Ŝajnas, en tio-ĉi kuŝas la tuta metodo de Leszetycki kaj tio-ĉi kreas lian ĉarmon inter la gelern-antoj. Ili vidas en la majstro veran „spiritan majstron”, kiu scias pri ĉiu el ili tion, kion ili mem ne scias.

Dediĉinte ĉiujn siajn fortojn al pedagogia agado, li povas esti nomata vera pedagogia genio. Tiun-ĉi vojon estis montrinta al li la unua el liaj plej gloraj lernantinoj, s-ino Jesipova, kun kiu poste li edziĝis; ŝi insistis ke li forrifuzu la artistan karieron kaj fariĝu pedagogo. Tio estis ankoraŭ en Rusujo, kie li kune kun Rubinŝtein fondis Peterburgan konservatorion en kiu li laboris ĝis 1878. Sed lin, kiel multajn aliajn geniojn, kiuj povus glorigi Rusujon, Rusujo ne sukcesis restigi! La popolo Leŝetickij preferis forlasi la malsanigan atmosferon de l' burokrata Peterburgo...

Vieno prezentis pli larĝan liberecon al lia bolanta energio, kaj jen ni vidas lin festantan en Vieno sian 80-jaran datrevenon, junece viglan kaj freŝan.

„Leszetycki”, oni murmuretas unu al alia, renkontante en la strato tiun-ĉi staturfortikan viron kun haroj, torditaj laŭ la modo de „rusa vilaĝano”, maljunulon, kiu ĉiam kun antaŭa lerteco suprensaltas irantan tramon.

Kaj neniu estis miregita, eksciinte antaŭ du jaroj, ke la maljunulo ree edziĝis kun unu el siaj junaj lernantinoj. Leszetycki bone rekompensis Vienon por ĝia gastameco. Vieno multe ŝatas sian famon de „ĉefurbo de muziko”, kaj tiun-ĉi famon Leszetycki ne malmulte subtenas per sia tiea agado. Kaj Vieno siavice varmege salutis la jubileulon, kiu estas kreinta ĉirkaŭ si tiun mirindan anguleton de muzikema Vieno.

El rusa gazeto „Ruskija Viedomosti” („Rusaj sciigoj”), № 138, 1910, tradukis

*Marja Ŝidlovskaja.*

## La Kanikulo.

Ĝi komencas sian regadon, enventurante en urbon, samtempe kun la forveturado de loĝantoj — kaj oscedas. Post ĝi, oscedas ĉio, kio restis en la urbo. La kukuma sezono, tiel nomita pro kukumoj, kiujn oni tiutempe ne povas akiri kaŭze ilia kareco, fundamente aliigas la urbon. Tial diris prave iu poeto, aŭ eble eĉ iu pensulo, ke: „Kiam la urbo forveturas el la urbo, tiam la urbo, kiu restis en la urbo, ne estas urbo”. — En tiu sola frazo, li diris ĉion pro kio niaj felietonistoj, kaj antaŭ ĉio humoristoj, foruzas multe da papero, da inko kaj de pacienco de l' legantoj, por ilin konvinki, ke ili skribas pri sezono morta, endormiginte ilin antaŭe per humorartikolo pri kanikulo.

La urbo ne estas do urbo. Mal-

pleneco sur stratoj, en publikaj apartamentoj, en komercejoj, en tramveturiloj, en oficejoj kaj en privataj domoj, kie la mallevitaj rulkurtenoj atestas pri forveturo de l' loĝantoj kaj pri libera enpaŝo en iliajn loĝejojn nur kun helpo de falsaj ŝlosiloj.

La strata policano, kiu alitempe estas tiel multe okupita, ke li iafoje ne vidas apudan sangan interbatiĝon, rimarkas hodiaŭ sensignifan malpacon de du paseretoj kaj donas al ili signon per mano, ke ili devas disiĝi. La fiakroj havas neniun por surveturi, la tramveturiloj ne havas kiun kontuzi, la kuracista savstacio havas neniun por savi, la hundkaptisto havas — krom hundoj, — neniun por kapti, neniu estas por enfaladi en truojn de pavimo kaj de

l' trotoaroj — ĉar estas kanikulo. En malplenaj kafejoj, la kelneroj solaj ludas bilardon kaj legas ĵurnalojn. La pagisto, por ne perdi ekzercadon, kalkulas la verukojn sur la nazo de l' bufedistino, nomita kasistino, pro tiu kaŭzo, ke ŝi ne administras kason. En restoracioj tia estas dezerto, ke eĉ la mastroj mem konsideras, ke kelkaj manĝaĵoj estas nemanĝeblaj kaj fordonacas ilin al kelneroj. En butikoj estas ankaŭ malplene; la komercistoj havas do sufiĉe da tempo, por eltiri antaŭjarajn galanteriaĵojn, ilin disspecigi kaj ekspoziti en fenestro, kun surskribo: „plej freŝa novaĵo”.


En oficejoj forestas la ĉefoj — kaj iliaj anstataŭantoj, profitante de malmulta enfluo de postaĵoj, konsciencie prilaboras la dormajn ŝuldrestaĵojn. En redakcioj, ĉe tabloj de ĉefredaktoroj, sidas ĉefreportistoj kaj pretigas numer-

on, por presado, ĉar la paĝmetisto ne volas pri tio scii, ke en mondo nenio okazas — kaj postulas materialon. Pro tio montras sin nepreco de tondilego, kiu tiutempe havas plej multe da inspiro; — tial aperas nun la mara serpento, atendinda tutan jaron. La ajn memmortigo fariĝas nun tiel dezirata, kiel alitempe ŝtatatenco aŭ nova milito kaj fervoja katastrofo atingas la orvaloron, preskaŭ kiel ĉefartikolo.

Nur vespere reviviĝas iom la urbo, kiam la oficistoj perfekte sufiĉe dormintaj, forlasas la kancelariojn, kiam ĉio revenas el parkoj kaj ĝardenoj, en urbon kaj kiam komencas agadi la „pajlaj vidvoj”, kiuj ekvolinte ripozi, forekspedis siajn edzinojn — ankaŭ por ripozo.

El la pola originalo de Kl., tradukis

*Helena Hempel.*



G. V. Korolenko.

## Fajretoj.

Jam antaŭ longe dum malluma aŭtuna vespero okazis al mi naĝi sur malafabla siberia rivero. Subite, sur la turniĝo de la rivero, antaŭe, sub mallumaj montoj ekbrilis fajreto.

Ĝi ekbrilis hele, forte, proksime...

— Nu, dankon al Dio! — diris mi kun ĝojo, — estas proksime vilaĝo — loko por nokto!

La remisto-siberiano turniĝis, ekrigardis trans la ŝultron la fajreton kaj denove indiferente prenis la remilon.

— Malproksime!..

Mi ne kredis: la fajreto staris, elirante antaŭen el la malklera mallumo. Sed la remisto estis prava: montriĝis, ke ĝi estis efektive malproksime.

La eco de ĉi tiuj noktaj fajretoj estas alproksimiĝi, venkante la mallumon, kaj brili, kaj promesi, kaj logi per sia proksimeco. Ŝajnas, jen-jen ankoraŭ du-tri batoj de remilo, kaj la vojo

estos finita. Sed dume — ĝi estas malproksime!

Kaj longe ankoraŭ ni naĝis sur la malafabla mallumega, kiel inko, rivero. Intermontoj kaj ŝtonegoj elnaĝis, surŝoviĝis kaj fornaĝis, restante malantaŭe kaj perdiĝante en senfina malproksimo; kaj la fajreto ĉiam allogante staris antaŭ ni ĉiam tiel same proksime, kaj tiel same malproksime.

Mi ofte rememoras nun kaj la malhuman riveron, ombritan de ŝtonegaj montoj, kaj ĉi tiun vivan fajreton. Multe da fajroj pli frue, kaj poste logis ne nur min per sia proksimeco. Sed la vivo fluas ĉiam en samaj malafablaj bordoj kaj la fajroj estas ankoraŭ malproksime. Kaj ree oni devas preni remilojn...

Sed tamen ĉiam antaŭe estas fajroj!

El la rusa lingvo tradukis

*Eŭropano.*

## Obowiązek Esperantysty.

Ze dzisiaj mimo wielkiego postępu ruchu esperanckiego we wszystkich kulturalnych państwach naszego globu, jeszcze miliony ludzi z ludu i niższych warstw społecznych nie słyszały nawet o istnieniu ruchu esperanckiego, nie może nas to dziwić wobec krótkości czasu od jego obudzenia się i braku informacji, a po części z powodu niskiego poziomu umysłowego wielkich mas. Rozważmy jednakże zapatrywania tych, których opatrność w lepszych materialnych warunkach postawiła i którzy bądź co bądź już coś nie coś o celach esperantyzmu słyszeli.

Większość dygnitarzy i ludzi zamoznych odpowie: „nam i bez Esperanta dobrze na świecie”. Inni, uznający w zasadzie ważność zadania zbliżenia i porozumiewania się ludzi wszystkich narodowości za pomocą niezmiernie łatwego międzynarodowego języka, powiadają: „nie mamy czasu zająć się tym”. Inni znów chcą czekać, bo przecież będzie jeszcze dość czasu przyłączyć się później, „jeżeli coś z tego będzie”.

Wygoda i przezorność jest po ich stronie, bo nie potrzebują wyęźać swych mózgów, poświęcać czas, pracę i środki materialne, a gdy „coś będzie”, to korzyści i oni będą mieli na równi z tymi, którzy nie szczydzili swych sił intelektualnych i materialnych, by ludzkość pchnąć krok naprzód na drodze postępu i cywilizacji.

Chcieć ludzi, którym Opatrność odmówiła chociażby iskierki szlachetniejszego natchnienia i poczucia solidarności ogólnoludzkiej, nawracać do idei esperantyzmu, wszczepiać w nich zasadę, że obowiązek człowieka nie tam się kończy, gdzie na pozór osobisty interes przestaje istnieć—jest niewdzięczną pracą.

Lecz istnieją jeszcze szerokie warstwy inteligencji, które zainteresowałyby się problematem, nie mają jednakże wiary, czy to ważne kulturalne zadanie

da się kiedykolwiek w zadawalający sposób rozwiązać lub czy właśnie Esperanto jest tym kluczem, który otworzy wszystkim narodom skarbnicę wielowiekowej duchowej pracy każdego narodu, ułatwi każdemu pobyt w obcym kraju, da naukom, przemysłowi, handlowi wspólną, międzynarodową podstałę porozumiewania się, uwolni młodzież od męczarni szkolnych (zwykle bezowocnych) uczenia się tylu języków obcych, który zbliży ludzkość do soli darności i przekonania o korzyściach stąd płynących.

Następnie stanowisko rządów wobec ruchu esperanckiego musi być wy-czekujące i najgorliwsi esperantysty nie mogą żądać energiczniejszego poparcia rządów, póki świat esperancki nie da namacalnych, w praktyce życia ujawnionych dowodów, że esperantyzm posiada wszelkie dane wysoce kulturalnego środka podniesienia umysłowego i materialnego stanu ludzkości.

Mamy jednakże tak wobec rządów, jak i wyżej wymienionych niedowiarków, bardzo dobry środek przekonywający chodzi tylko o to, byśmy lepiej niżle dotąd z niego korzystali. Musimy o wiele silniej popierać literaturę i piśmiennictwo esperanckie. Musimy wątpiącym naocznie wykazać, że Esperanto posiada samo w sobie tyle siły żywotnej, tyle niedościgłych przez żaden język zalet, że wytrzyma zwycięsko porównanie z każdym naturalnym językiem, że określa każdą myśl ludzką, każde dzieło ducha ludzkiego w piśmie i mowie tak ściśle, jak to w ogóle tylko jest możliwym. Innymi słowy musimy się przy-czynić do rozwoju piśmiennictwa esperanckiego, kupując o wiele pochopniej dobre książki esperanckie i abonując odpowiednie czasopisma esperanckie.

Mamy już dzisiaj wybitnych lingwistów esperanckich, którzy bez wahania podjęliby się tłumaczenia wielu znakomych dzieł z języków narodowych; wstrzymuje ich tylko myśl, czy praca ta

nie będzie daremna, czy książka nie będzie bezużytecznie spoczywała na półkach księgarskich.

Podobnie dzieje się z czasopismami. Jest ich, co prawda, tymczasem wystarczająca liczba, lecz stosunek liczbowy esperantystów do abonentów wymienionych pism jest bardzo niekorzystny, tak, że redakcje nie są w możności myśleć o rozszerzeniu łam pism, o udoskonaleniach i t. d., a często ponoszą znaczne straty materialne.

Tak książki, jak pisma esperanckie są tanie, a esperantysta z przekonania, rozumiejący znaczenie i dążenia esperantyzmu, winien posiadać dość konsekwencji do wprowadzenia w czyn swych teoretycznych przekonań, winien odczuć w swej duszy tyle ofiarności, by poświęcić rocznie stosunkowo drobną kwotę na podtrzymanie piśmiennictwa esperanckiego. Zresztą, kto się interesuje chociaż trochę życiem ducho-

wym obcych narodów, znajdzie już dzisiaj w literaturze esperanckiej znaczny wybór dzieł pierwszorzędnej wartości, których w oryginale nie czytał lub czytać nie może; w czasopismach zaś esperanckich znajdzie tyle ciekawych wiadomości z krajów całej kuli ziemskiej, że ten mały wydatek w stosunku do duchowej strawy i korzyści rozszerzenia własnego umysłowego widnokągu, jest nic nieznaczący.

Popierając zaś tym sposobem rozwój literatury i piśmiennictwa esperanckiego mamy najlepszy dowód, że ruch esperancki to nie produkt mrzonki jakichś z nieba spadłych utopistów, a zastosowanie w życiu praktycznym idei śmiałej, lecz racjonalnej i wszelkie dane dalszego rozwoju posiadającej, idei, której przeprowadzenie nieobliczalny wpływ wywrze na bieg cywilizacji ludzkiej.

Drezno.

R. Maske.

## Por nia Ekspozicio.

Daŭrige (vidu la polan artikoleon en nia lasta N-ro, paĝo 75) la sekvantaj personoj bonvolis oferi monon por nia Ekspozicio:

D-ro Kazimierz Bein 10 rb., S-ro Feliks Zamenhof 10 rb., D-ro S. Krukowski 5 rb., D-ro J. Gelibter, el Zamość 5 rb., D-ro M. Kraŭshar 3 rb., kaj kelkaj aliaj personoj, kies la nomoj ni publikigos iom pli malfrue. Ĝis nun oni efektive jam oferis aŭ nur deklaris por nia Ekspozicio apenaŭ 214 rubloj, sed ni devas havi almenaŭ 300 rublojn *kaj tial mi petas tre, tre insiste ĉiujn polajn esperantistojn sendi sub mia adreso, kiom oni povas kaj plej frue.*

Krom tio la sekvantaj Institucioj, Societoj, Redakcioj, Eldonistoj kaj aliaj personoj bonvolis jam sendi al ni diversajn ekspozitajn por nia Ekspozicio:

*Esperantista Centra Oficejo* (de S-ro Generalo H. Seberty), Paris. — „*Burgonja Stelo*” (S-roj Balandra et Royer) en Chalon-sur-Saône. — „*Esperanto - Bulletin*” (de S-ro Joh. Lüneman) en Hago. — *Esperanto Verlag Möller kaj Borel*, el Berlin. — „*Gestudentaj Intereso Tuthomaraj*” de S-ro Eduard Zatezky en Kraków. — *Harlema Katolika Esperantista Grupo*, en Harlem (Holando). — „*Lorena Stelo*” de D-ro Noel en Nancy. — *Manufacture Française d'Armes et Cycles*—Saint-Etienne (de S-roj Direktoroj Mimard kaj Blachon). — „*Nederlanda Kato-*

*liko*” (S-ro Joh. Lüneman) en Hago. — „*Revuo de la Kongresoj*” (de S-ro Fr. C. de Skel-Giörling) en Brukselo. — *Serba Esperantista Societo* (de S-ro Ing. Dragomir M. Andonović, Universitata Docento), en Belgrad. — *Sociedad de Atracción de Forasteros* en Barcelona. — *Universala Esperanta Asocio*, en Genevo. — *Universala Esperanta Librejo*, en Genevo (ĝi pruntis por nia Ekspozicio, la belan, *esperantan* poŝhorloĝon). — S-ro *Boirac Emile*, Rektoro de la Dijona Universitato. — S-ro *Bolingbroke - Mudie H.*, en Londono. — Pastro *Bianchini Giacomo* en Fontanafredda (Itallando). — F-ino *N. Bonn* en Haag. — S-ro *F. Durieux*, Direktoro de la Montequieu Lernejo en Lille. — S-ro *Fomenko V. K.* el Odessa. — S-roj *Higgie and Coy* en Rothesay (Scotlando). — S-ro *Inglada Ors Vicente*, ŝtabakapitano, en Toledo. — S-ro *Kókai Ludoviko*, esperanta librovendisto kaj eldonisto, en Budapeŝto. — S-ro *Margulies St.* en Łódź. — S-ro Prof-o *Meazzini Giacomo* en Arezzo (Itallando). — S-ro D-ro *Wrzosek Adam*, Prof-o de la Universitato en Kraków.

Dankante plejkore por la favora memoro pri nia Ekspozicio al ĉiuj supre cititaj Institucioj, Societoj, Redakcioj kaj personoj — ni ankoraŭ ripetas nian varmegan peton al tiuj, kiuj ĝis nun sendis nenion.

Aleks. Bol. Brzostowski

Varsovio, str. Krucza 9.



## La ŝtato Marilando oficiale aprobas Esperanton.

Je la 11-a de Aprilo 1910. Lia Moŝto Austin L. Crothers, guberniestro de Marilando, subskribis la leĝoprojekton, kiu permesas la instruadon de Esperanto en la lernejoj publikaj de tiu ŝtato.

Tio ĉi estas la unua okazo en Usono, kiam ŝtato oficiale metas Esperanton en sian leĝaron. Tial sendube estos interese al niaj legantoj havi resumon de tiu-ĉi leĝoprojekto, kiu nun fariĝis efektiva leĝo, kune kun mallonga redaktaĵo pri la tiel progresema ŝtato Marilando.

La leĝoprojekto estis enkondukita de la jena antaŭparolo:

„Vidante, ke la Internacia Lingvo Esperanto faras efektivan progreson en multaj el la progresemaj nacioj de la mondo, kaj estas aprobita de kelkaj internaciaj kongresoj, kaj

„Vidante, ke tiu ĉi lingvo kontentigas la longe sentitan bezonon por simpligita, sed supera komunikilo inter la nacioj, ne elpuŝante naciajn lingvojn, sed provizante duan lingvon al ĉiuj; tial

„Fariĝu leĝo de la Ĝenerala Konsilantaro de Marilando, ke en ĉiu distrikta lernejo estu instruataj” (jen estas nomataj la ordinaraĵoj de lernado) „kaj la elementoj de agrikultura scienco kaj la Internacia Lingvo Esperanto, povas, laŭ la kontrolo de la Ŝtata Konsilantaro pri Edukado, esti aldonitaj al la fakoj, kiuj devas esti instruataj en la Ŝtataj Normalaj Lernejoj, kaj en la lernejoj publikaj de la diversaj regionoj de la ŝtato”.

La konvinkado de la kongresanoj, ke ili devus fari tian leĝon, estas precipe farita de S-ro James L. Smiley, en Anapoliso, helpite de S-ro George Mosa, en la sama urbo, kaj de Profesoro W. J. Spillman, kaj S-ro Karl F. Kellerman, de la Usona Agrikultura departamento en Washington, kaj de S-ro

Edwin C. Reed, sekretario de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko kaj de la Sesa Kongreso.

La Ŝtato Marilando estas la plej proksima de la urbo Washington. De Naturo, Marilando estas grandege favorata je multeco kaj diverseco de propuktaĵoj. Ĝia Chesapeake Bay (ĉesepik bej), la plej granda enlanda salakvo en Usono, estas riĉega je fiŝoj kaj ĉasaĵoj. Anasoj kaj aliaj birdoj vizitas ĝiajn bordojn en sia sezono, kaj el ĝiaj akvoj oni povas kapti krabojn, ostrojn, alozojn, percojn, haringojn, ktp. Oni povas same rakonti pri la produktado de la lando. Ĝiaj fruktoj estas bongustegaj kaj multenombraj; fragoj kaj aliaj beroj, persikoj, pomoj, piroj, akvomelonoj, kaj diversaj legomoj troviĝas senmanke.

La orienta bordo estas fama pri siaj bonegaj persikoj; la sudaj provincoj pro tabako. Tra la tuta ŝtato oni kreskigas maizon, tritikon, kaj aliajn grenojn. Veturante okcidenten, de tajdakvo ĝis la montoj, oni preterpasas riĉajn farmbienojn kies produktado evidentiĝas per la grandegaj kaj belaj grenejoj. La montoj enhavas multege da kverkarbo.

Baltimoro, la metropolo, enhavante proksimume 700.000 loĝantojn, estas la sidejo de la famekonata Johns Hopkins Universitato. Tiu ĉi urbo estas nomata „La Monumenta Urbo” pro la multeco kaj beleco de monumentoj.

La ŝtata ĉefurbo, Annapoliso, sidante sur duoninsulo apud la rivero Severn, enhavas la „Ŝtatan Domon”, la Kolegion de S-ta Johano, kaj la faman Usonian Lernejon por Maraj Militistoj.

Marilando ĝojas, ke „La Sesa” okazas la nunan jaron tiel proksime de ĝiaj limoj, kaj klopodas por helpi la urbon Washington en korega bonveno al niaj vizitantoj de multaj nacioj.



## Mia deziro.

*Per papiliaj flugiletoj oraj  
Mi en velurajn flugus arbaretojn  
Kaj el violoj, el rozoj odoraj  
Mi kolektadus printempajn ridetojn...  
Aŭ en lilia kaliko lulante  
Mi najtingalan aŭskultus kantadon  
Aŭ sur zefira ondo balancante  
Ĉe font' arĝentan admirus kaskadon...  
Sed plej prefere el deziroj ĉiaj:  
Potenca reĝo estus de l' ameco —  
Kaj virgajn korojn kaj sentojn iliajn  
Sendese tenus en mallibereco!..  
Ĉar ol la floroj, kaskadoj, zefiroj*

*Kaj ol ĉiela lazuro senfina  
Pli karaj estas al mi la safiroj  
De l' admirinda okulo knabina...  
Anstataŭ flugi en valon flor-rozan  
Kun multkolora papilia ondo,  
Al belulinoj himnon grandiozan  
Mi en ilia ĝoja kantus rondo...  
Anstataŭ suĉi lilian nektaron  
Aŭ en ĉieloj flugpendi senfinaj,  
Mi plej prefere ĵetiĝus en maron  
De l' ĉirkaŭprenoj kaj kisoj knabinaj!..*

Serczuk (Galicio).

## Kronika. — Kroniko.

**Varsovio.** En la №№ 168—169 de la varsovia gazeto „Gazeta Warszawska“ aperis longa artikolo de S-ro Muttermilch pri la lingvo internacia. La aŭtoro, kiu videble tute ne konas la nuntempan staton de tiu ĉi demando kaj ankaŭ ne havas pri ĝi sian propran opinion, konsilas laŭ la propono de Fürstenhof elekti kiel internacian lingvon — la francan. En sia miopeco li opinias, ke li tiamaniere solvis gravan demandon pri lingvo internacia. Bone respondis al li en alia organo „Dzień“ (№ 192—193) S-ro Z. Greffkowicz, sekretario de „P. E. S.“, kiu elmontris al li lian tutan ignoron pri la ektuŝita demando kaj S-ro Sandecki.

La ĉiutaga ĵurnalo „Dzień“ (Tago) komencis publikigi periodajn artikolojn pri Esperanto.

El Varsovio forveturis Vaŝingtonon al la VI Kongreso krom D-ro L. L. Zamenhof kun lia edzino ankaŭ S-ino Teofila Essigman. Al la Aŭgsburga kongreso de U. E. A. forveturis el Varsovio D-ro W. Róbin (sekretario de T. E. K. A.) kaj D-ro Chybczyński; ambaŭ kiel kuracistoj partoprenis ankaŭ en la kongreso de T. E. K. A. kaj en la ekskurso al la aŭstraj banlokoj organizita la unuan fojon de esperantistoj-kuracistoj.

**Krakovo.** En la raporto de la Di-

rekcio de la Komerca Akademio en Krakovo por la jaro 1910, ni trovas sciigojn pri regula instruo de Esperanto en tiu ĉi lernejo dum la pasinta lerna jaro. Ni vidas el tiu ĉi raporto, ke Esperanto estis enkondukita en la Akademion, dank' al la peto de parencoj. Kiel instruanto estis S-ro Br. Kuhl. La loka esperantista Societo oferis al la Akademia biblioteko sufiĉe grandan nombron da libroj, kiuj estas scivole legataj de la lernantoj. Kiel simpatie estis akceptita Esperanto en la Akademio, ni vidas el la kompara statistiko: la francan lingvon (ne devigan) lernis 19 lernantoj, Esperanton ankaŭ ne devigan — 21.

**Lodzo (Łódź).** Ni ĵus trasloĝiĝis novan loĝejon ĉe la strato Mikołajewska 11 (kune kun „Lira“), kie okazis hodiaŭ la unua kunveno de la societanoj. Ĝi estis malfermita per parolado de la prezidanto S-ro Ender, kiu alvokis al propagando de esperantismo en Lodzo kaj per varmaj vortoj esprimis deziron por nia societo en nova ejo. La gesocietanoj, malgraŭ libera tempo kaj foresto de multaj, kolektiĝis en nombro de kelkdeko da personoj kaj bone amuziĝis en sia bela loĝejo. Konstante ni kolektiĝos ĉiun merkredon, krom tio ankoraŭ unu fojon en semajno (sabate aŭ dimanĉe alterne). *Ago.*

## Diversajoj.

### Cirkulero.

Moskva Societo Esperantista, pridiskutinte la starigitan de Peterburga kunveturo de Esperantistoj demandon pri aranĝo de Tutruslanda Kongreso en Moskvo en la jaro 1911 konstatis sufiĉe urĝa la bezonon de tia kongreso. Tamen, kiel opinias la societanoj, la Kongreso estas efektivebla nur kondiĉe, se esperantistaj societoj, grupoj kaj organizacioj mem helpos al la afero per sia solidara kunlaborado kaj amikeca subteno. Komprenante grandegan gravecon kaj malfacilecon de la entrepreno, sed samtempe esperante sen ia dubo la konsenton al la afero de ĉiuj ruslandaj esperantistaj organizacioj, ilian potencan kunhelpon kaj ageman subtenon, M. S. E. decidis preni sur sin la iniciativon kaj senprokraste komenci la antaŭpreparajn laborojn. Kun tiu celo ĝi decidis, ke estu elektita aparta Organiza Komitato, konsistanta el 7 membroj de M. S. E. kaj 3 reprezentantoj de ceteraj Moskvaj esperantistaj organizacioj, kaj samtempe elektis de M. S. E. 7 personojn, kies nomoj estas malsupre subskribitaj.

Ĉar la ellaborado de la konforma programo kaj ĉefe la registara permeso de la kongreso postulas sufiĉe multe da tempo, M. S. E., pridiskutinte zorge kaj ĉiuflanke la demandon pri la tempo de l' kongreso, kiu devas esti bone akordigita kun plej oportunaj kondiĉoj de vintra aŭ printempa libertempo de oficistoj kaj lernantoj, provizore elektis por la kongreso Kristnaskajn tagojn de la jaro 1911. Se tamen la plimulto da esperantistaj societoj kaj organizacioj trovos pli oportuna kaj dezirinda la kongreson dum Paska semajno, ĝi neniel povas esti efektivegata pli frue ol dum Pasko 1912.

La demando pri tio, kiom da tagoj daŭros la kongreso, restas malfermita ĝis kiam estos definitive ellaborita la programo de la kongreso. Tamen, se la Societoj kaj grupoj

havas pri tiu ĉi demando iujn konsiderojn, ili bonvolu sciigi siajn opiniojn al la subskribintoj.

Plej grava demando, kunligita tiel kun la produktiveco de l' kongreso mem kiel ankaŭ kun la komunaj interesoj de ĉiuj esperantistaj organizacioj, sendube estas la demando pri la programo de l' kongreso; tial ili ĉiuj nepre devus ageme partopreni en ĝia ellaborado. La organiza Komitato de la Tutruslanda Kongreso de Esperantistoj kaj reprezentantoj de Esperantistaj Societoj kaj organizacioj, ricevonte de la lastaj la demandojn, pridiskutotajn en la kongreso kaj aldoninte al ili kelkajn ĝeneralajn demandojn de la organiza signifo, konforme ilin grupigos kaj definitive starigos la programon de la kongreso, kiu poste kune kun la peto pri permeso estos sendita al la registaro.

Konklude, la subskribintaj anoj de l' estonta organiza Komitato, elektitaj de Moskva Societo Esperantista, sin turnas al ĉiuj esperantistaj societoj, organizacioj kaj grupoj, petante ilin kiel eble plej baldaŭ kaj neniel pli malfrue ol al la 1-a de Septembro 1910.

1) Sciigi sian opinion pri la plej oportuna tempo por la Kongreso;

2) se ili deziras—diri siajn proponojn pri la daŭro de l' kongreso;

3) sciigi pri la dezirindaj demandoj, enmetotaj en la programon de la Kongreso.

La respondojn oni bonvolu sendi laŭ la jena adreso:

Moskvo, Pokrovskija vorota, Hoĥlovskij pereulok, 10, al S-ro Georgij Ivanoviĉ Smirnov.

S-inoj O. Gabrik, A. Smirnov, S-roj R. Mencil, A. Saĥarov, G. Smirnov, S. Ŝabarin, D-ro K. Ŝidlovskij, V. Podnarskij (provizora reprezentanto de Moskva Studenta Grupo „Esperanto”).



## BIBLIOGRAFIO.

„Pola Esperantisto“ raportas nur pri verkoj alsendotaj  
al la redakcio en du ekzempleroj.

TUTMONDA JARLIBRO ESPERANTI-  
STA 1910, enhavante esperantistan societaron,  
liston de la konsulejoj, societoj kaj grupoj (se-  
sa eldono) de Esperantista Centra Oficejo. 1  
vol.—280 paĝa, prezo 3 fr. Paris, Hachette  
et C-ie, 79, Boulevard Saint Germain.

LA DEVO de Ernest Naville, parolado  
adresita al la sinjorinoj de Genevo kaj de  
Lauzano, tradukis René de Saussure, prezid-  
anto de Svisa Esperanta Societo. 1 vol.—152  
paĝa. Genevo, Librejo Kündig 11, Corra-  
terie 1910.

VORTARO ESPERANTA-PORTUGALA  
de Tobias R. Leite. 1 vol.—176 paĝa. Paris  
Libraire Hachette et C-ie, 79, Boulevard Saint  
Germain.

PLENA KURSO DE LA INTERNACIA  
LINGVO ESPERANTO (ruse) de T. A. Ŝca-  
vinskij, dua eldono. 1 vol. — 89 paĝa, prezo  
60 kop. Librejo „Esperanto“ Moskvo, 28,  
Tverskaja.

LA LOGIKA KONSTRUO DE VORTOJ  
EN ESPERANTO (france) respondo al kri-  
tikoj kun proponoj al la Esperantista Akade-  
mio de Antido. 1 vol. — 83 paĝa, prezo  $\text{S}$   
0,65. Universala Esperanto Librejo 10, rue de  
la Bourse, Genève.

BSPERANTA POŜKALENDARO por  
1910, eldonita de Redaktoro Fritz Stephan,  
Leipzig. 1 vol. — 96 paĝa, prezo 0,40  $\text{S}$ . Lei-  
pzig, Johannisplatz 4/5. Esperanto Verlag C.  
W. B. Naumburg.

PRI LA TRANSKRIBO DE LA PROPR-  
AJ NOMOJ. Esperantista Centra Oficejo,  
Esperantista Dokumentaro pri la oficialaj, hi-  
storiaj, bibliografiaj kaj statistikaj aferoj, ka-  
jero 15. Raporto de Gaston Moch. 1 vol. —  
91 paĝa. Paris, Esperantista Centra Oficejo,  
51, rue de Clichy 1910.

MODELA KLASIFIKO DE ESPERANT-  
AJ BIBLIOTEKOJ laŭ la sistemo de la de-  
cimala klasifiko uzata por la universala Bi-  
bliografia repertorio, originale verkita de Ge-  
neralo Sebert, ano de la franca Instituto. 1  
vol. — 30 paĝa, prezo fr. 0,50. Esperantista  
Centra Oficejo, 51, rue de Clichy, Paris.

LA VIZITO EN LA KARCIERO humorajo  
de Ernst Eckstein kun sep originalaj ilustr-  
ajoj de G. Gundblad, el la germana lingvo tra-  
dukis Rod. Freencks. 1 vol. — 47 paĝa, pre-  
zo  $\text{S}$  0,30. Düsseldorf, Rod. Freerick, Helm-  
holzstrasse 7.

LA BIBLIA PROFETO CEFANJAHO,  
antaŭanoncinta Esperanto, el la originalo tra-  
dukita. 1 vol. — 18 paĝa, prezo 0,20  $\text{S}$ . Pa-  
ris, Presa Esperantista Societo, 33, rue La-  
cépède. 1910.

VENENO, unuakta komedio, originale  
verkita en Esperanto de Ramon Limones. 1  
vol. — 30 paĝa, prezo 0,50  $\text{S}$ . Mexico, Im-  
prenta Internacional 1-a Aduara Vieja Num 4.  
1910.

SING ME TO SLEEP (kantu por mi en  
vesperhor') el la angla lingvo transponis G.  
L. Browne London, muziko de Edw. Greene  
London Phillips et Page 8 Oxford Market W.

## Dulinvga enigmo.

originale verkita de  
*Feliks Lotto.*

Mezlumo. Tra densaj, bruantaj folioj  
Pentras scivole la lastaj radioj  
De l' jam subiranta sunглоbo purpura.  
Glitante sur mola muskgrundo velura,  
Disjetas mallongajn, brilantajn pajlerojn  
Sur trunkojn, sub herbo kaŝitajn fragberojn,  
Kuŝiĝas sur funga, koketa bireto,  
Aŭ la araneon origas en reto —  
Elvokas el buŝo de l' junkavaliro  
Subitan ekkrion de vera admiro  
Nun ekbriliĝinte en blonda tufeto,  
En dolĉaj rozvangoj de la fraŭlineto  
Kaj tuj forlasinte amantan sin paron  
Jen malproksimiĝas profundan arbaron  
Por fine perej post ombraj deklivoj.  
En ŝia orelo nur du adjektivoj  
Li ekparoletis karese, petole...  
La nom' de armilo formiĝas sin-pole  
El tiuj du vortoj en unu ligita.  
Per ŝtonoj altprezaj ĝi pliriĉigita,  
Servante al pli, ol por unu nur celo  
Ekpendis ĉe flanko de pola nobelo:  
Ĝin portis li grave en gaja festbalo,  
Ĝin svingis venkema al sanga batalo,  
Dum seĝma kunveno, ĉe kruĉ' mielplena,  
Post laŭta kverelo, parolo malbena.  
Ho, kiom da fojoj renkonto duela  
Per ĝi jam finiĝis kun morto kruela.  
— Pripensu malmulte kaj diru, leganto:  
Do, kiujn du vortoj murmuris l' amanto?